

# Gazeto



# Andaluzia



Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

19-a Jarkolekto \* Aprilo 2002 \* N-ro 68

ISSN 1576-0618



Martos, fone la impona rokego

# GAZETO ANDALUZIA

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.  
Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto

REDACCIÓN: C/ Armengual de la Mota 33, 4-D, 29007 MÁLAGA.

DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.

IMPRIME: La Reprografía, MÁLAGA.

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ

REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO (Apartado 5184,  
29080 MÁLAGA, [esperanto@ciudadfutura.com](mailto:esperanto@ciudadfutura.com))

José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ  
([esperanto14@supercable.es](mailto:esperanto14@supercable.es))

COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ,  
José Antonio VALVERDE MARTÍN

## ENHAVO

Eĥoj el Esperantio .....	3
Esperanto-Infoj en Andaluzio .....	5
Eĥoj el Andaluzio .....	6
Melila Angulo .....	9
Andaluza Monto meze de Romo .....	10
Dialogoj kun mia Edzino .....	11
Novelo: <i>Kleopatra kaj la Junulo</i> .....	13
Interlingvistiko: <i>Auxil</i> .....	15
Paĝoj de Nia Historio .....	21
Radioamatora Angulo .....	23
Vorta Piramido .....	24
Andaluza Kuirarto .....	25
Flamenko .....	26
Diversaĵoj .....	27
Turismi en <i>Martos</i> .....	28
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio .....	30
Esperanto Aplikata .....	32

Nota: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.  
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



## EĤOJ EL ESPERANTIO

*Esperanto-Televido eblas per Interreto*

La Sekretario de Esperanta Radikala Asocio, Giorgio Pagano prezentis pasintjare al kelkaj partoprenantoj en la Internacia Junulara Festivalo en Bolsena (Italio), iniciaton pri la eblecoj starigi "Esperanto-TV", t.e. informa programo en televida formo, dissendata per TTT de Interreto.

ERA dissendas nun alvokon al ĉiuj esperantistoj kiuj estus pretaj kunlabori, precipe tiuj kiuj havas iom da kompetenco (eĉ nur hobia) pri televido, kameraoj aŭ simile. Do, temas ankaŭ pri alvoko al reĝisoroj, aktoroj, redaktoroj kaj ĉiukaze al interesitoj.

Se Vi deziras peti pliajn informojn aŭ kunlabori iumaniere, ni konsilas al Vi viziti ĉe Interreton la TTT-paĝon: <http://www.esperanto.tv> .

*La Papo denove uzas Esperanton*

"Feliĉan Paskon en Kristo resurektinta" estis la esperantlingva frazo prononcita de la Papo Johano Paŭlo la 2-a la pasintan paskan dimanĉon en la Placo Sankta Petro ĉe Vatikanurbo. La Papo salutis antaŭ ol beni la urbon Romon kaj la mondon (Urbi et Orbi) en sesdeko da lingvoj, kaj inter ili kaj ĝuste antaŭ la pola kaj la latina, en Esperanto.

Sed ĉi-jare ĉi tiu jam kutima uzo de la internacia lingvo estis speciala, ĉar inter la ĉeestantoj en la Placo Sankta Petro estis grupo da geesperantistoj kiuj portis afiŝojn formantaj la jenan vorton: E-S-P-E-R-A-N-T-O. La afiŝaro estis perfekte videbla dum la televida programo kiuj elsendis la papan benon en la tutan mondon. Venontpaĝe Vi povas vidi fotografajon de la esperantista grupeto ĝuste antaŭ la Vatikana Palaco sur la Placo Sankta Petro.

Ni memorigas ke la Papo Johano Paŭlo la 2-a uzas Esperanton okaze de siaj tradiciaj plurlingvaj salutoj al la tuta mondo ekde la jaro 1994.



Esperantistoj sur la Placo Sankta Petro (Vatikanurbo)  
la pasintan Paskan Dimanĉon

### *Fondiĝas MONDA UNIVERSITATO*

MONDA UNIVERSITATO (MU), estas edukada entrepreno organizata kaj aŭspiciata de Brazila Esperanto-Ligo, celante disponigi al interesatoj kursojn kaj lernobjektojn pri temaro proponita de docentoj kaj spertuloj. La efikeco de la diversaj kursoj estas strikte kontrolata de la organizado de MU, kiu liveros atestilojn al la lernanto post fina ekzameno. La eduksistema bazo de MU estas rekta kontakto inter la tema spertulo kaj la lernanto, surbaze de interreta kontakto.

Ĉiuj temoj estas eblaj, kondiĉe ke la komisiono pri temaro de MU aprobu la lernmaterialon kaj la instruprogramon proponitaj de la instruistoj. Komence, oni ne havos kursojn kun diversaj lernobjektoj, sed simplajn kursojn pri specifaj temoj. Espereble, en estonteco, tiu universitato fariĝos kiel eble plej proksima al konvencie ekzistantaj universitatoj. En nuna momento, oni celas arigi la homojn kiuj deziras instrui temajn lernobjektojn kaj proponojn por kursoj el interesataj lernantoj. Kadre de MU oni povas havi sciencajn temojn, kiel astronomion, statistikon, geologion kaj ankaŭ aliajn temojn kiel akupunturon, bestbredadon, florajn aranĝojn inter aliaj.

Ĉiuj lernobjektoj estos instruataj kontraŭ antaŭdifinitaj kostoj. La administrado de MU kontrolos la lernantan pagon kaj la laborpagon al la instruistoj aŭ docentoj, aldonita de la administra kosto. Ĝenerale, MU ne celas profiton,

tamen la akirita kapitalo parte iros al Brazilia Esperanto-Ligo por plia diskonigo kaj laboroj por Esperanto-movado. La dungitaj laboristoj kaj ĝeneralaj elspezoj de la universitato pagos la proprajn universitatajn enspezojn.

La ekesta organizado de ĉi tiu nova institucio estas sub la estrigo de D-ro Adonis SALIBA, kiu laboras sub administra kontrolo kaj apogo de Brazilia Esperanto-Ligo. Pliajn informojn Vi povas legi ĉe Interreto sub la TTT-paĝo <http://www.esperanto.org.br/mu/>

## ESPERANTO-INFORMOJ EN ANDALUZIO

\* La pasintan 28an de februaro Esperanta Jura Asocio, aŭspicita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, ekfunkciis sian novan TTT-paĝon ĉe Interreto je la adreso <http://es.geocities.com/ejaaeu/index.htm> . Ene de ĉi tiu nova paĝo troviĝas ĝeneralaj informoj pri EJA, asocio kie renkontiĝas la esperantistaro kiu profesie aŭ pro studoj rilatas al la jura mondo. La paĝo ofertas oftan renoviĝon ĉar ene de ĝi aperas aktualajn informojn pri internacie konataj juraj kazoj kaj ankaŭ la traduko en esperanton de tekstoj pri internaciaj aferoj, ekz. gravaj deklaroj rilataj al la konflikto Israelo-Palestino.

\* Unu el la akordoj de la pasinta Ĝenerala Asembleo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estis la ekfunkciigo de interreta partoprenejo de nia asocio. La celo estas provizii al ĉiuj membroj de nia asocio de loko kie proponi, diskuti kaj demandi aferojn rilataj al la disvastigo de la internacia lingvo en Andaluzio. La nomo de ĉi tiu nova servo estas "Opiniaro". La respondeculo estas la Prezidanto de la asocio Andrés Martín, kiu dufoje monate sendas al ĉiuj membroj disponantaj pri Interreto aron da informoj, proponoj kaj interesaj aferoj pri Esperanto en Andaluzio. Se Vi havas interretan aliron kaj al Vi interesas ĉi tiu nova projekto de nia asocio kontaktu kun: [esperanto@navegalia.com](mailto:esperanto@navegalia.com) .

\* Baldaŭ renoviĝos la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. En ĝi, krom informado pri Esperanto, ni deziras aperigi informojn pri Andaluzio rilataj al turismo, historio, vizitindaj lokoj, ktp. La celo de ĉi tiu nova sekcio estus informigi al alilandaj esperantistoj pri la taŭgeco viziti Andaluzion. Pro tio ni kontaktis kun la turisma entrepreno de la Andaluza Registaro por peti permeson por publikigi ene de ĉi tiu nova TTT-paĝo informojn, bildojn kaj fotografaĵojn nun aperantaj sur la turisma paĝo <http://www.andalucia.org> . La respondo de la koncernaj aŭtoritatoj estis pozitiva kaj ekde nun ni povos uzi la materialon tie aperantaj. Ni esperas ke tio plialtkvalitos la novan TTT-paĝon de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

## ◀ EĤOJ EL ANDALUZIO ▶

### Hŭelvanino honorigita per la Ordeno de la Brita Imperio.-

Isabel NAYLOR MÉNDEZ estas sepdekjaraĝa hŭelvanino, ŝia patro estis brita inĝeniero kiu venis en Hŭelvon por labori ĉe la Riotintaj Minejoj. Antaŭ kelkaj monatoj la brita konsulo en Sevilo rekompencis ŝin per la medalo de la Brita Imperio, la dua plej grava honorigo en Britio. Ŝi ricevis tiun rekompencan ĉar ŝi, semajnon post semajno, portis florojn en la tombo de la brita civitano William MARTIN, entombigita en Hŭelvo kaj kiu estas pli konata kiel "la viro ne-ekzistanta".

Post la figuro de William MARTIN troviĝas unu el la plej kuriozaj historioj pri spionoj dum la dua mondmilito. La brita spiona servo organizis en la jaro 1943 operacion por trompi la germanan armeon en Italio. Brita submarŝipo lasis apud la marbordo de Hŭelvo kadavron de viro mortinta pro pneŭmonio ĉe angla hospitalo, alia versio diras, ke li memmortigis sin. La britoj metis sur ĝi identigkarton diranta, ke li nomiĝis William Martin kaj ke li estis altranga oficiro de la brita armeo. Apud ĝi troviĝis paperujn enhavanta supozitajn gravegajn dokumentojn.

Hispana fiŝkaptisto trovis la kadavron kaj li rapide informis pri tio al la hispanaj aŭtoritatoj, tiutempe amikoj de la hitlera reĝimo, kiuj havigis la

dokumentojn al Germanio. Laŭ tiuj paperoj la usona kaj britaj armeoj planis invadi Italion tra Sardlando. Tiel, Hitler ordonis sendi preskaŭ ĉiujn trupojn el Italio en Sardlandon. Siaofoje la britoj kaj usonanoj ekinvadis Italion tra alia insulo Sicilio. La operacio milite sukcesis.

La patro de Isabel NAYLOR portis freŝajn florojn ĉiusemajne al la tombejo de William MARTIN, kiu post esplorado de historiisto, verŝajne, li nomiĝis Glyndwr MICHAEL. Post la morto de la patro de Isabel ŝi mem portis la florojn, kvankam ŝi ne memoras kial ŝia patro kutimis fari tion semajnon post semajno.

La brita konsulo en Sevilo proponis al la brita ambasadejo en Madrido, rekompenci tiun agadon kiu memorigis britan civilulon kiu ebligis, post sia morto, venkon de la brita armeo dum la dua mondmilito.



En la jaro 1956, 20th Century Fox produktis la filmon *The man who never was* (La viro kiu neniam ekzistis). La filmo rakontis ĉi spionan operacion.

## Peto por venigi en Andaluzion kvar mil arabajn librojn

La komunisma grupo de la Andaluzia Parlamento prezentos peton al la Andaluzia Registaro por ekigi la necesajn demarŝojn kiuj devus finiĝi per la reveno en Granado de 4.000 arabaj libroj savitaj el la brul-detruo okazita en ĉi tiu urbo en la jaro 1502 ordonita de la Kardinalo Cisneros.


Kurioze estis la Kardinalo Cisneros mem kiu elektis la librojn kiuj ne suferus "la purigitan bruligadon", ĉar temis pri libroj pri medicino, botaniko, matematiko kaj leĝoj. Cisneros ordonis porti la librojn en sian episkopan palacon en Alcalá de Henares (Madrido) kaj poste en la Monaĥejon El Escorial, kie ili estis la bazo de la Reĝa Biblioteko.

La libroj savitaj el la brul-detruo en Granado estis la bazo de la Reĝa Biblioteko en El Escorial (Madrido)



En la monato marto 2001, la kultura asocio Garnata 2000 kaj aliaj akademiaj instancoj, prezentis saman peton al la Kultura Departamento de la Andaluzia Registaro, sed la sola respondo estis ke la Departamento estis favora mikrofili la tutan libron.

La nova peto baziĝas sur la propra hispana konstitucio kaj la rekomendo de UNESKO rilate la kulturajn posedaĵojn de la popoloj, laŭ ĉi internacia organizo ili devas esti kiel eble plej proksima al la origin-loko




---

## 62-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

de la 1-a ĝis la 4-a de aŭgusto 2002.

Colegio Mayor Universitario de Alicante. Campus de la Universidad  
s/n. San Vicente del Raspeig (Alicante)

augustocasquero@infonegocio.com

## Gari KASPAROV venkas en la ŝaklud-turniro de Linares

La rusa Gari KASPAROV atintis la unuan premion, kaj tio jam okazas kvar sinsekvaj fojoj, de la Ŝakluda Turniro de Linares (Jaeno). La duan lokon atingis la ukranian Ruslán Ponomárico, dekokjaraĝa, kiu, ludante kun blankaj figuroj, nur povis finigi sendecide sian partion kontraŭ la bharaata Viswanathan Anand.

Okaze de la lasta partio la rusa Kasparov venkis la hispanan Shirov. Kiel jam okazis dum la unua partio inter ambaŭ ludantoj ili salutis sin nek antaŭ nek post la partio. Shirov, ludante kun blankaj figuroj, alvenis antaŭ Kasparov, ludis rapide sian unuan movon kaj tuj foriris por ne atendi side la rusan Kasparov.

Memoru la nomoj de la ŝak-figuroj en Esperanto: reĝo, damo, kuriero, ĉevalo, turo, peono.

Fine, la partio inter ambaŭ disvolviĝis tre strange, sed iom-post-iome la rusa Kasparov atingis pli bonan situacion, do la ludado de Shirov fariĝis tute senespera. Fine, Shirov akceptis sian malvenkon, post 28 movoj kaj tri horoj da intensa ludado. Kasparov venkis la prestiĝan turniron kun 8 poentoj, la dua loko estis por Ponomariov kun 6 '5.

Jen, la lasta partio inter la rusa Kasparov kun nigraj figuroj kaj Shirov.

1. e4 c5 2. Ĉf3 Ĉc6 3. d4 Pxd4  
4. Ĉxd4 Ĉf6 5. Ĉc3 e5 6. Ĉd4b5 d6  
7. Kg5 a6 8. Ĉa3 b5 9. Kxf6 Pxf6  
10. Ĉd5 f5 11. Kxb5 Pxb5 12. Ĉxb5  
Ta4 13. b4 Dh4 14. 0-0 Tg8 15. f4  
Rd8 16. c3 Ta6 17. a4 Pxe4 18. f5  
Kb7 19. Ta2 e3 20. Ĉxe3 De4 21.  
De1 Ĉxb4 22. Pxb4 Kh6 23. Rh1  
Kxb3 24. De2 Ec6 25. a5 Dxb4 26.  
Ĉd6 Dxd6 27. Dxe3 Dd4 28.  
Dc1 Dd5 Tiam la blankaj figuroj  
forlasis la partion, la minaco kontraŭ  
g2 de la damo, kuriero kaj turo nigraj  
estas konstanta.

---

## 83-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

de la 3-a ĝis la 10-a aŭgusto 2002 en Fortaleza (Brazilo)

<http://www.uea.org>

pliajn informojn: [uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net)



# MELILA ANGULO

 José A. Valverde Martín

## La Berebera Geedziĝo

Kiel vi jam scias, la berebera estas grava ero de Melilo, kaj geedziĝe ili influadas kaj estas influadataj. Tiun ĉi influon oni vidas antaŭe, ĉar indas rimarki, ke la ceremonio mem estas ege bela kaj aŭtentika.

La devenoj de la ceremonio estas du:

- a) la praa moro berebera: geedziĝo estas kontrakto inter aŭ en la klanoj.
- b) La *sunna* aŭ islama moro.

La komenco de la ceremonio ne okazas laŭ la berebera maniero, sed juĝeje, en la civila geedziĝo. Tie, ili plenumas la necesojn laŭlegajn kaj interŝanĝas ringojn.

Poste, la venontan tagon proksimume, ekkomenciĝas la ceremonio. Ĝi konsistas el tri tagoj:

\* Unua tago: estas la festo por la fianĉino, nur inter virinoj, en kiu ŝi estas prezentata kiel edziĝontulino. Kelkfoje la fianĉo havas la saman feston inter viroj, sed ne ĉiam.

\* Dua tago: la geedziĝontoj sin renkontas. Kiam ŝi estas antaŭ la edziĝontulo ŝi estas malkovrata. Ŝiaj amikinoj kaj fratinoj ekkomencas plori aŭ plorumi. La fianĉino ŝanĝas siajn vestaĵojn multfoje dum oni ĝuas noktomanĝon.

Tria tago: okazas la ceremonio geedziĝa. Vespere, oni trinkas teon kun mento (*attaj s na' na*) kaj manĝas kuskuson (*siso*). Dume, oni donacas al ili manĝaĵojn. Poste okazas vojo per aŭtomobilo hupante tra la urbo aŭ la kvartalo.

Tio ĉi influadis Melilajn morojn kaj estas la rezulto de influo. Kiel, kiuj kaj kiaj?

\* La berebera uzo de la hupilo por komuniki al la genajbaroj la ĝojon kaŭze de la geedziĝo.

\* La plimulto de la geedziĝaj festoj estas strate kaj la tuta najbararo estas invitata.

La eŭropan influon oni vidas en:

\* la uzado de la hispana.

\* Samtempe la kontrakto de muzikistoj.

\* Multfoje la uzo de ejoj por la festoj.

\* La uzo de ringoj.

Tiu ĉi miksaĵo estas bonega ekzemplo de la aŭtentika kaj tolerema kunvivado Melile.

## ANDALUZA MONTO MEZE DE ROMO

La *Testaccio* (pr. testaĉjo) estas monto kiu troviĝas en la urbo Romo kies origino estas tute andaluzia. Sub ĝi enteriĝis 25 milionojn da amforoj uzataj dum la epoko de la Romia Imperio por transporti oleon el la Betika Provinco (hodiaŭ Andaluzio) ĝis la eterna urbo Romo. La esplorado de hispanaj arkeologiistoj, plenumitaj dum la lasta jardeko, helpis kompreni dank'al la deĉifrado de stampoj kaj stonaj gravuraĵoj, kiel disvolviĝis la komercaj rilatoj en la antikva Romo. La rezultoj de ĉi tiuj esplor-laboroj aperas ene de libro eldonita de la Universitato de Barcelono kies kunordiganto estas la sevila arkeologiisto José REMESAL.



En antikva gravuraĵo la numero 3 indikas la monton TESTACCIO el la rivero Tiber.

Laŭ REMESAL, kiu kunordigis ne nur la libron sed ankaŭ la arkeologiajn esploradojn sur la monto Testaccio, la amforoj enhavantaj andaluzan oleon atingis eĉ Hindion, sed plejparte el ili provizis la okcidentan

parton de la Romia Imperio. Laŭ la arkeologiistoj la monto ekformiĝis dum la 2-a jarcento kaj ĝi mezuras laŭlonge pli ol unu kilometro kaj la fina rezulto aspektas natura monto. Oni diras pri ĝi, ke temas pri la oka roma monteno, kvankam, ĉi-foje ne estas natura sed artefarita.

La unuaj amforoj estis deponitaj laŭ rekta linio kaj poste sur ili deponiĝis tunoj kaj tunoj de pliaj amforoj. Laŭ la kalkuloj la kvanto da oleo transportata povis provizumi la necesojn de oliv-oleo de unu miliono da personoj, ses litroj po persono jare, dum 250 jaroj. Ĉar la amforojn oni ellaboris de ceramikistoj de la Betika Provinco uzante materialon de tiu loko mem, do, oni povas aserti ke temas pri monto formata de andaluzia tero kiu situĝas meze de Romo.

La eksporto de oliv-oleo de la Betika Provinco en Romon estis bonega negoco dum tiu epoko, kvankam la pagotan precon de la produkto ĉiam fiksis imper-oficistoj. La neceso de oleo fare de la romanoj estis tiel granda ke aliaj regionoj de la Imperio, kiuj ankaŭ ricevis la produkton, preferis reeksporti ĝin en Romon kaj atingi tiel mon-gajnojn dank'al la reeksportado.

Nuntempe la Testaccio estas montento sur la suda parto de la historia centro de Romo apud la Monto Aventino kaj la Pordego Sankta Paŭlo. En ĝi troviĝas malgrandaj butikoj, ĝi posedas bonajn publikajn transportojn kaj bonetosan noktan vivon. Ĉi tio lasta estas komprenebla afero, vole-nevole temas pri andaluzia ter-peco meze de Romo.

## Dialogoj kun mia Edzino

Dimanĉa ekskurso. -

ŜI.- Ludoviko metu la aŭtomobilon ĉi tien, kiel eble plej proksime al la pordo, ĉar mi devas ŝarĝi multajn pakaĵojn kaj mi ne volas trapasi la straton.

MI.- Karulino mia, ĉu ĉi tie estas bone parkumita la aŭtomobilo? Ĉu vi havas la necesan spacon por meti tiun amason da senutilaj pakaĵoj?

ŜI.- Ĉi tie la nura senutila estas vi, mi jam devus alvoki la urban policon, por ke ili konstatu, kia malbona stiristo vi estas. Eĉ ne estas loko inter nia aŭtomobilo kaj ĉi tiu alia, mi ne scias, kiamaniere mi povos enmeti ĉion.

MI.- Ne tiom grumblu, kio okazas estas ke vi estas tre dika.

ŜI.- Ludoviko, Ludoviko, ni havu la feston pace, ĉar mi ne volas paroli. Kaj vi kiu ŝajnas sako da terpomoj, estus pli bone, ke vi silentu anstataŭ min kritiki. Kaj ĉu vi ne diras, ke la virinojn grasetajn viaj okuloj rigardas kun speciala avido, Ha! Silentu! Silentu! ne kolerigu min.

MI.- Nu, ni laboru ĉar alikaze, alvenos la vespero kaj ni ankoraŭ estos ĉi tie. Vi jam portis la tablon, la seĝon, tiun aparaton, la kradon por rosti la viandon. Estas hodiaŭ forta suno, sed vi ankaŭ volas kunporti tiun pluvombrelon (sunombrelo, ŝi korektis al mi). Ankaŭ jam estas interne la lantolaĵoj, por ke vi povu -longe kaj larĝe- por ilin etendi teren kaj vi povos ankaŭ "longe kaj larĝe" kuŝi sur ĝin. Estas ankaŭ tiu portebla glacigilo, la trinkaĵoj, la kafo, la viando, la pano, la manĝilaro, la hundeto...

ŜI.- Mi pensas, ke ĉio estas en ordo, ĉu laŭ via opinio io mankas? Ŝi demandis al mi.

MI.- Jes, mankas io, tre grava por vi, kaj kion ĝis nun mi ne vidis enpakigita. Ŝi restadis dum sufiĉa longa tempo pensanta, cerbumante. Fine, ĉar ŝi ne kapablis scii kio estas kio mankas, ŝi demandis min, kio estas tio mia kara edzo? Nu, kio mankas laŭ mia kontrolo, estas tiu oleo aŭ similaĵo, kiun vi metas sur vian korpon,

por ke la sunradioj ne bruligu aŭ difektu vian delikatan haŭton. Kaj ankoraŭ vi diras, ke mi ne amas vin!

ŜI.- Ha! Jes. Ha! Jes, ŝi ripetis kelkajn fojojn. Ho! Mia edzeto, kiel mi dankas vin pro via afableco.

MI.- Ŝi reviziis ĉion, eniris en la domon por ion kontroli, konsultis liston "sekretan" kiun ŝi havis, kaj fine venis al la konkludo, ke ĉio estas en ordo. Kia feliĉo!

La aŭtomobilo estis plenplena, ĉar ne pensu, ke ĉi tie mi ĉion menciis, se tio mi estus farinta, mi rakontus ĝis la fino de la mondo. Nu, post multaj malfacilaĵoj kaj kelkaj puŝoj miaj, mi sukcesis sidigi ŝin kaj meti ĉirkaŭ ŝin la ĉastecan zonon (tio estas ŝerco), kompreneble mi aludas al la –sekuriga zono- por eviti gravajn vundojn okaze de akcidento. Mi intencis fermi la malantaŭan pordon kaj mi ne povis. Pato, pli bone dirite kelkaj patoj, malhelpis por fermi la pordon. Kio okazas? Ŝi demandis, nenion mi respondis. Mi devas puŝi internen tiun skatolon kun la patoj kaj manĝilaro por povi fermi la pordon fine mi klarigis. Patrino mia! Sed kion mi diris!

ŜI.- Ne, faru nenion! Malligu min de ĉi tiu malbenita zono kaj mi ĉion aranĝos. Alimaniere vi kun tiuj manaĉoj, kiujn vi havas ĉion malbonigos, eĉ la poton de la kikerroj. Nu, jen mi eltirante ŝin. Forpasis preskaŭ duono horo, kaj jen denove mi lokigante ŝin en ŝia sidloko.

MI.- Mi ekfunkciigis la motoron, la aŭtomobilo jam estis preta por starti, sed la diablo ĉion misfaris. Jes, komencis eliri najbarinoj por ŝin saluti, por deziri al ni la plej bonan vojaĝon kaj la plej bonan ekskursan tagon. La interviringa babilado ne ĉesis. La tempo pasadis rapide, mia edzino kaj ŝiaj najbarinoj atentis pri nenio. Ili komencis kritiki la junulinon loĝanta en sama strato, ĉar ŝi kunportis jupeton, laŭ ili, provokiga. Mi ne sciis kion fari, mi ne povis interveni, ĉar tio jam signifus riski mian vivon. Kaj la babilado neniam finiĝas.

Fine, mi diris al mia edzino, nun ni ne forveturos ĉar estas malfrue, jam estas meztago, kaj pli bone estas manĝi trankvile hejme, kaj eble posttagmeze ni povos iri al iu urba parko. Ŝi grumblis, sed ĉar la evidento pravigis min, en tiu momento finiĝis la ekskurso. Mi sola devis eltiri de la aŭtomobilo ĉiujn pakaĵojn, ĉar ŝi daŭre estis okupata en la senfina najbara konversacio.

Luis Serrano Pérez

## NOVELO

KLEOPATRA KAJ LA JUNULO

Ŝi ne sciis ĉu pro kutimo, ĉu pro higieno aŭ tutsimple ĉar la vetero varmiĝis, sed la realo estis ke Kleopatra, ĉiunokte dumsomere, subakviĝis en la granda rivero. Ŝi emis fari tion kiel eble plej malfrue, diste de la okuloj de la simplaj homoj, ĉar Kleopatra ene de tiuj akvoj kaj sub tiu sufokanta varmeco banis sin senveste, tute senveste. Nur la okuloj de la luno rigardis ŝin nokton post nokto.

Tiunokte, la okuloj de la luno estis ege malfermitaj, en la nokta ĉielo la luno estis ege blanka, kaj tiu hela brilo provokis ke Kleopatra, kaj kompreneble ŝia korpo, estis iomete pli videbla. Sed tio ne gravis. Ŝi lernis elekti la taŭgajn horon kaj lokon por ke neniu, absolute neniu, povus ĝeni ŝin.

Kaj ofte tio okazis tiamaniere. Sed tiunokte ĉio ŝajnis malsimila. La luno brilis multege kaj Kleopatra, iom honte, sentis ke iu rigardis ŝin. Ŝi pensis, ke sendube temis pri la okuloj de la luno, sed ne, la okuloj ŝajnis pli proksimaj. La deziro de viro ne estas kiel la deziro de la luno kaj ŝi sentis ke iu rigardis ŝin plezurege. Subite, kelkaj kanoj en la rivero moviĝis, do, ŝi ekaĝis ĝis ili. Tie, kaŝite, honteme, aperis junulo rigardanta ŝin.

*Kion vi faras ĉi tie?*- Demandis Kleopatra. *Mi rigardas mian reĝinon*-respondis la junulo. *Ĉu vi ne scias ke ĉi tiu fiago povus kosti al vi via vivo? Ĉu vi ne scias ke vidi vian reĝinon senvesta povus signifi perdi vian kapon? Mi tion scias, ho mia reĝino*-respondis la junulo, *sed mi ne povis eviti ĝin. Via beleco estis pli forta ol mia timo.*

Rapide, Kleopatra eliris el la rivero. Ŝi apenaŭ sekiĝis kaj poste ŝi vestis sin. Ŝi ordonis al la soldatoj malliberigi la junulon. Kaj tiel okazis. La junulo, timema, malseka sed feliĉa, estis arestata ĉe la malliberejo de la reĝina palaco. Dume, Kleopatra, komforta en sia dormoĉambro, pensis pri la puno kiun tiu junulo devus ricevi.

Ke tiu fiago supozus la morton de la junulo tio ŝajnis evidenta. Sed, Kleopatra ankaŭ sentis sin iomete kontenta. La junulo miris ŝian korpon, li diris, ke ŝi estis bela kaj tiujn vortojn, kaj krome tiun sincerecon, ŝi ne sentis de antaŭlonge.

Tamen, ŝi estis la reĝino, preskaŭ vivanta diino, kaj ŝi ne povis toleri ke iu simpla homo povu vidi ŝin senvesta kaj post tiu fiagado li daŭrigus sian vivon. Kleopatra pruvis esti justa al la junulo, aŭ almenaŭ kiel eble plej justa. Ŝi, nepre, devis puni lian agon, sed samtempe ŝi devis premii lin pro liaj vortoj. Sed, kiamaniere plenumi ambaŭ devojn? Eĉ ne la saĝeco, nek la povo de tiu kiu estis vivanta diino povus solvi tiun aferon. Subite, ŝi trovis la solvon. Kleopatra ordonis la mortigon de la junulo, sed samtempe ŝi permesus al li ĝui apud kiu ajn virino ĝis la sun-eliro, ja apud kiu ajn virino.

*Ĉu eĉ apud la reĝino mem?*- Demandis la junulo. *Jesja, eĉ apud mi mem.* Respondis Kleopatra, kiu ree sentis sin plenĝoja. La horoj ĝis la sun-eliro estis intensaj. Paroli pri ili estas neeble ĉar nur ambaŭ scias kio vere okazis dum tiu tempo. Neniu scias kion ili faris, kion ili diris, antaŭe ŝi estis vivanta diino kaj timema junulo, sed dum tiuj horoj ili estis tutsimple viro kaj virino.

Sed, la suno finfine eliris. Ĝia oranĝa koloro anoncis ke ĉio jam finiĝis. La junulon oni portis en la eŝafodon, tie la ekzekutisto devus plenumi sian laboron. Oni diras, ke kiam la junulo supreniris la ŝtuparojn li havis grandegan rideton. La ekzekutisto demandis lin ĉu li ne estis timema pro sia baldaŭa morto. *Ne, tute ne.* Oni diras, ke li respondis. *Ĝuste nun, mi estas pli viva ol neniam antaŭe.*

J.R.



# INTERLINGVISTIKO



J.M.R.H.

AUXIL auxilia vos.

## AUXIL

Komence de la jaro 1949 mortis la Monaĥo HONORÉ, li lasis ne-finita la laborojn por la kreo de nova help-lingvo. Kelkajn jarojn poste, lia kunlaboranto A. DE BELIE, kiu poste iĝus *interlingua*-isto, finis la laboron kaj eldonis la *Gramatika d'Auxil. Lingua Auxiliar Schematico-Natural*. HONORÉ estis idisto kiu jam en la jaro 1933 publikigis artikolon sur idorevuo pri la neceso forlasi la artefaritajn finaĵojn. Kiel en Esperanto, ankaŭ en Ido la sustantivoj finiĝas per O, la adjektivoj per A, la adverboj per E, ktp...

Li preferis help-lingvon kun ritmo pli natura sen fiksjaj finaĵoj. Laŭ li, internacia lingvo ne devus esti io senmova, sed dinamika kiel la vivantaj homoj. Laŭ la vortoj de Honoré tiom da reguloj estis la pesto de la internaciaj lingvoj.

AUXIL estas kreaĵo kiu aperis post la morto de lia kreanto. Do, la projekto neniam estis vere uzata. Aperis nek originalaĵoj, nek revuoj, nek tradukitaj literaturaĵoj. Nure, sur la libro-metodo de AUXIL verkita de Belie aperas resumo en la nova lingvo de la internacia rakonto *Blanquenville e le sept nani*.

Laŭ DE BELIE, AUXIL posedas la simplecon de la angla gramatiko, la facilan ortografion de la hispana, la ĉarmecon de la franca, la belsonecon de la itala kaj la forton de la germana. Kaj ĉi ĉio uzante la vortaron de la okcidentaj lingvoj.

Verdire, AUXIL estas evoluo de la internacia lingvo Ido, kiu siafoje estas evoluo de Esperanto. AUXIL posedas vortaron tute simila al Ido kaj eĉ ripetas, preskaŭ tute simile al Ido, la abundan serion da sufiksoj. Sed, AUXIL estas antaŭan paŝon en la naturigo de la help-lingvoj, t.e. oni preferas ellabori lingvon kiel eble plej natura anstataŭ preferi la facilecon de la tute regulaj projektoj, kiel Esperanto. Ĉi-sence oni proponas elementojn kiuj poste aperus sur la projekto *Interlingua*, ni ne forgesu ke AUXIL aperas nur kelkajn jarojn antaŭ la lingvo de IALA.

Kio restas nun de AUXIL? Verdire, nenio. Eĉ Interreto enhavas neniun paĝon dediĉita al ĉi tiu lingvo, kaj nur ene de tre specialigitaj bibliotekoj aperas la 3 libretoj publikigitaj en ĉi tiu help-lingvo.

GRAMATIKOAlfabeto.-

A-B-C-D-E-F-G-H-I-J-K-L-M-N-O-P-Q-  
R-S-T-U-V-W-X-Y-Z

Ĉiuj ili similas al Esperanto-prononco, escepte:

C = /k/ antaŭ a,o,u

C = /s/ aŭ /ts/ antaŭ e,i

G = /ĝ/ antaŭ e kaj i.

J = /ĝ/

Q=/k/ sekvita de u (kiel en la hispana). Escepte se sekvas alia vokalo, tiam = /ku/ ekz. *aquatic*

W = /ŭ/

X = /ks/

Y = /j/

Kaj la jenaj kunmetaĵoj:

CH = /ĉ/                      SH = /ŝ/

SCH = /sk/                  GN = /nj hispana ñ/

OO = /u/

La akcento ĉiam estas sur la antaŭlasta silabo, kiel en Esperanto. Escepte en la vortoj devenitaj de orient-europaj lingvoj, ĉi-kaze la akcento estas simila al tiu de la originala vorto.

Artikoloj.

LE = la.

LES = en pluralo se ĝi akompanas adjektivon ne indikanta pluralon. Ekz. *le unesme leciono* = la unuaj lecionoj  
*les unesme* = la unuaj

LA = se ĝi mencias in-vortojn.

DE+LE = DEL

DA+LE = DAL

A + LE = AL

Ne-difinita artikolo = UN

Pronomoj.-

MI = mi

TU = vi

IL = li

EL = ŝi

OL = ĝi

NOS = ni

VOS = vi

ILI = ili

ELI = ili (ŝi)

OLI = ili (ĝi)

MIE = mia

TUE = via

SUE = lia, ŝia,  
ĝia, sia.

NOSTRE = nia

VOSTRE = via

SUE = ilia

Pluralo.-

TABLO = tablo    TABLI = tabloj

PROFESOR = profesoro

PROFESORI = profesoroj

Kiam oni ne povas demeti la lastan vokalon, ĉar ĝi indikas sekson, ekz. AMICO / AMICA, oni uzas la pluralan finaĵon S:

AMICOS = amikoj

AMICAS = amikinoj

Sustantivoj.-

Ne ekzistas propra finaĵo por la sustantivoj, kvankam se oni deziras indiki sekson, oni uzas O (viroj) kaj A (virinoj).

Adjektivoj.-

Finiĝas per E, kvankam ĉi tiu finaĵo ankaŭ povas malaperi.

LE VIR ROBUSTE = la forta viro

LA BEL FILIA = la bela filino

EL HAVA BLU OCULI = Ŝi havas blujn okulojn.



Verboj.-

La infinitivoj finiĝas per AR. Se la radiko de la verbo finiĝas per C aŭ G, tiam la infinitivo finiĝas per ER.

AMAR = ami      DICER = diri  
ESAR = esti      HAVAR = havi

AS	IS	OS	US
Ama	Amaba	Amara	Amaria
Dice	Diceba	Dicera	Diceria
Es	Esaba	Esara	Esaria
Ha	Haba	Hara	Haria

U: Ama, Dice, Ese, He, Ese.

Numeroj.-

1 = un    2 = du    3 = tri    4 = quar  
5 = cinco / cinque      6 = six  
7 = sept / septe    8 = oct / octe  
9 = non    10 = dece  
11 = dece un    12 = dece du  
13 = dece tri ...    19 = dece non  
20 = duante    21 = duante un  
30 = triante    40 = quarante  
50 = cincante    60 = sixante  
70 = septante    80 = octante  
90 = nonante    100 = cent  
200 = du cent    300 = tri cent  
900 = non cent    1.000 = mil  
2.000 = du mil    9.000 = non mil  
1.000.000 = milion

1.968 = mil non cent sixante oct

Unua = prime / unesme  
Dua = duesme    Tria = triese  
Kvara = quaresme...

Demandoj.-

La verbo situiĝas antaŭ la subjekto.

TU HA UN HUNDO = vi havas hundon  
HA TU UN HUNDO? = Ĉu vi havas hundon?

Komparativoj.-

PLU ... QUAM = pli ... ol  
MIN... QUAM = malpli ... ol  
TAM... QUAM = tiel ... kiel  
PLI BONA = melior  
PLI MALBONA = peor

EKZEMPLOJ / EXEMPLI

\* Mia patro ne laboras en ĉi tiu urbo

MIE PATRE NO LABORA IN CIT URBE.

\* Ĉu vi parolas Auxil?

PARLA TU AUXIL?

\* Ne, mi ankoraŭ ne eklernis ĝin, sed baldaŭ mi parolos tiun lingvon.

NO, MI ANCORE NE LERNESKABA OL, SED PRONTE ME PARLARA CE LINGUE.

\* Mi havas amikinson. Hieraŭ mi manĝis ĉe ŝi. Ŝi laboras en lernejo.

MI HA AMICA. HIER ME MANGIBA CHE EL. EL LABORA EN UN SCOL.

PRAKTIKU VI MEM  
PRACTICE TU MISME

\* Mi legas libron

~~(me lecta un libro)~~

\* Ĉu vi havas aŭtomobilon?

~~(ĉa tu un auto?)~~

\* Diru al via patro, ke mia amikino iros ĉe li baldaŭ.

~~(Dice al tue patro, que mio amica vadara ĉe il pronto)~~

\* Le jurnal dice que deman le infantos potera dansar en le scol

~~(la ĵurnale diras, ke morgaŭ la infanoj povos danci en la lernejo)~~

\* Le lun hodie es min grand quam hier.

~~(la luno hodiaŭ estas malpli granda ol hieraŭ)~~

\* Lernara tu Esperanto od Auxil?  
Me lernaria ambe lingui, sed mi no ha tempe por parlaroli.

~~(Ĉu vi lernas Esperanton aŭ Auxil?  
Mi lernus ambaŭ lingvojn, sed mi ne havas tempon por lerni ilin komplete.)~~

KELKAJ SUFIKSOJ EN AUXIL.-

ABLE = ebla	ADE = ad
AN = an	AR = ar
ERIE = ej	ESCAR = ek-
ET = et	IFAR = ig
ILE = il	IST = ist
UYE = uj	BEL- = bo-
PAR- = fari ion komplete.	
DES- = mal-	MIS- = mis-
RE- = re-	

BIBLIOGRAFIO

FR. HONORE et A. DE BELIE  
*Gramatica d'AUXIL. Lingua Auxiliar Schematic-Natural.* Knokke, Belgio.

A. DE BELIE *Manual d'Auxil. Metodo Direct.* Knokke, Belgio.

Sciu ke por diri MI AMAS VIN en Auxil Vi devos skribi:

MI AMA TU

## VORTARO / VOCABLARE

Akvo	<i>aque</i>	Glaso	<i>glas</i>	Malgranda	<i>desgrand</i>
Al	<i>a</i>	Granda	<i>grand</i>	Mangî	<i>mangere</i>
Alia	<i>altre</i>	Hieraŭ	<i>hier</i>	Mono	<i>pecunie</i>
Ami	<i>amar</i>	Havi	<i>havar</i>	Morgaŭ	<i>deman</i>
Antaŭ	<i>ante</i>	Hodiaŭ	<i>hodie</i>	Multo	<i>mult</i>
Aŭ	<i>o (d)</i>	Horo	<i>hore</i>	Ne	<i>no</i>
Aŭdi	<i>audar</i>	Hundo	<i>hundo / a</i>	Nigra	<i>nigre</i>
Bela	<i>bel</i>	Infano	<i>infanto / a</i>	Nomo	<i>nom</i>
Besto	<i>animal</i>	Inter	<i>inter</i>	Olda	<i>old</i>
Birdo	<i>ucel</i>	Iri	<i>vadar</i>	Paroli	<i>parlar</i>
Blanka	<i>blanc</i>	Jaro	<i>ane</i>	Patro	<i>patre</i>
Blua	<i>blu</i>	Jes	<i>yes</i>	Patrino	<i>matre</i>
Bona	<i>bon</i>	Juna	<i>yun</i>	Post	<i>post</i>
Botelo	<i>botel</i>	Jurnalo	<i>jurnal</i>	Povi	<i>poter</i>
Ĉar	<i>nam</i>	Kaj	<i>e (t)</i>	Ruĝa	<i>red</i>
Ĉevalo	<i>cavalo / a</i>	Kapo	<i>cap</i>	Seĝo	<i>sed</i>
Ĉiam	<i>sempre</i>	Ke	<i>que</i>	Skribi	<i>scribar</i>
Ĉi tie	<i>hic / hique</i>	Kelka	<i>quelque</i>	Studi	<i>studiar</i>
Ĉi tiu	<i>ci / cit</i>	Kiam	<i>quande</i>	Studanto	<i>studento/a</i>
Danci	<i>dansar</i>	Kiom	<i>quante</i>	Sub	<i>sub</i>
Dankon	<i>danke</i>	Kial	<i>porque</i>	Suno	<i>sun</i>
De	<i>de</i>	Kie	<i>ube</i>	Ŝuo	<i>shu</i>
Dento	<i>dento</i>	Kio	<i>que</i>	Tago	<i>die</i>
Devi	<i>devar</i>	Kiu	<i>qua</i>	Tempo	<i>tempe</i>
Dio	<i>deo</i>	Kun	<i>con</i>	Urbo	<i>urbe</i>
Dolĉa	<i>dolce</i>	Kvankam	<i>quanquam</i>	Vendejo	<i>butique</i>
Domo	<i>dome</i>	Labori	<i>laborar</i>	Viro	<i>vir</i>
Doni	<i>donar</i>	Lakto	<i>lact</i>	Vorto	<i>vocable</i>
En	<i>in</i>	Legi	<i>leger</i>		
Esti	<i>esar</i>	Lernejo	<i>scol</i>		
Facila	<i>facile</i>	Lerni	<i>lernar</i>		
Floro	<i>flor</i>	Letero	<i>letre</i>		
Forta	<i>forte</i>	Libro	<i>libre</i>		
Frato (ino)	<i>fratre (a)</i>	Lingvo	<i>lingue</i>		
Freŝa	<i>fresh</i>	Longa	<i>long</i>		
Glaso	<i>glas</i>	Luno	<i>lun</i>		

Ofte, la redakcio de *Gazeto Andaluzia* ricevas inform-petojn pri nia rubriko INTERLINGVISTIKO. Por informi al ĉiuj eblaj interesitoj pri la lingvoj ĝis nun pritraktitaj, jen kompleta listo.

VOLAPÜK (n-ro 54)	RO (n-ro 61)
SOLRESOL (n-ro 55)	INTERLINGUA (n-ro 62)
NOVIAL (n-ro 56)	NEO (n-ro 63)
OCCIDENTAL (n-ro 57)	GLOSSA (n-ro 64)
LATINO SINE FLEXIONE (n-ro 58)	LING (n-ro 65)
IDO (n-ro 59)	PICTO (n-ro 66)
UNITARIO (n-ro 60)	VIKTO (n-ro 67)

Se Vi estas interesita en ĉi tiu rubriko kaj mankas al Vi la paĝoj dediĉitaj al unu aŭ kelkaj el tiuj help-lingvoj, ne hezitu peti ilin en la jenan adreson:

Rubriko INTERLINGVISTIKO  
GAZETO ANDALUZIA  
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo  
Apartado de Correos 3142  
E-14080 CÓRDOBA (Hispanio)

### EKSTERORDINARA ASEMBLEO ĜENERALA DE ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

Mi alvokas ĉiujn membrojn de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ĉeesti kaj partopreni en la Eksterordinara Asembleo Ĝenerala de ĉi tiu asocio okazonta en ties sidejo en Malago, la 31-an de majo 2002.

*Tagordo*

Legado kaj aprobo, se dece, de la akto de la antaŭa asembleo.  
Elektado de du membroj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kiuj reprezentos delegitece ĉi tiun asocion en la asembleo de la Paktintoj tio estas en la Forumo de Esperanta Civito.  
Petoj kaj Demandoj.

Malago, la 2-an de majo, 2002

Andrés Martín González  
Prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

## Paĝoj pri Nia Historio

### *Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio*

### Skoltismo kaj Esperanto en Andaluzio



SKOLTA ESPERANTO-LIGO

La skoltismo estas internacia movado por la junulara kaj la infanaro. Ĝia celo, ĉefe, estas disciplinigi aventuremajn junulojn, donante al ili eblecon vivi laŭ knabaj instiktoj, tamen lernante memstarecon, progresante laŭ pedagogiaj principoj. Ĝi estis fondita de la brita Robert Baden Powell en la jaro 1908. En la jaro 1918 la angla trupestro A. W. Thomson ekpensis fondi Skoltan Esperantistan Ligon SEL. La celoj de ĉi tiu asocio estis disvastigi skoltajn idealojn per Esperanto; disvastigi Esperanton inter la skoltaro; krei skoltan E-literaturon; eldoni internacian skoltan revuon kaj solidarigi la senton de frateco, komuna en la skolta kaj Esperantomovadoj, inter diversnaciaj junuloj.

Sed unu jaron antaŭ, ĝuste en 1917, Esperanto jam estis lingvo instruata en la lokaj skoltaj komitatoj de San Fernando kaj Jerezo (Kadizo). Ni sciu iomete plu pri la afero. En la jaro 1916 fondiĝis la skolta grupo en San Fernando (Kadizo). La instrukciisto de la klubo estis S-ro José Garzón Ruiz, prestiĝa advokato de San Fernando, li estis unu el la plej aktivaj andaluzaj esperantistoj dum tiuj jaroj kaj ankaŭ la fondinto de ĉi tiu revuo mem.

S-ro José Garzón Ruiz, malgraŭ lia preskaŭ kvindeka jaraĝo, estis aktiva skoltisto kaj li, ofte, akompanis la junulojn dum la kamparaj ekskursoj. Tiel en la jaro 1918, li gvidis la sanfernandan skoltan trupon en Jerezon per trajno kaj de tie en la *Cartuja*-n de Jerezo kaj aliaj vizitindaj lokoj de la urbo.

La skolta grupo de San Fernando organizis, sub la konstanta helpado de la S-ro Garzón, klasojn pri Topografio, Gimnastiko, Sanigado, Telegrafio kaj Esperanto. Li afable pruntedonis sian kamparan bienon kaj eĉ sian propran hejmon, en la strato Muñoz Torrero n-ro 10, kie ankaŭ troviĝis la redakcejo de la unuaepoka *Gazeto Andaluzia*, por organizi ĉiujn skoltajn agadojn. La lingvo Esperanto, instruata de la S-ro Garzón, ĝuis grandan sukceson inter la skoltistoj de San Fernando.

Ĉe la skolta trupo de Jerezo Esperanto ankaŭ estis afero instruata. Tiel en la jaro 1918, la S-ro Pedro Naranjo Terán, laboristo ĉe vinkelo kaj respondeculo de la E-movado en Jerezo, organizis kurson de la internacia lingvo por skoltistoj en la strato Sevilla n-ro 31.

Sendube S-ro GARZÓN influis kaj helpis la instruadon de Esperanto la skolta movado ne nur en San Fernando sed ankaŭ ĉe la Jereza trupo. Sendube ŝuldiĝas al la prestiĝo de la S-ro GARZÓN la fakto ke ĉiuj publikaĵoj de la kadizaj skoltaj grupoj opiniis tre favore rilate la instruadon de la internacia lingvo ĉe la skolta movado. La lasta informo kiun oni trovas pri S-ro GARZÓN kiel skoltisto estas la manĝado de li oferita al pli ol cent junaj skoltistoj de la provinco Kadizo. Li, tiutempe, estis la provinca delegito de la skolta movado.

Finiĝas, ĉi tie, la historio de la instruado de Esperanto ĉe la skoltaj trupoj de Kadizo. Ne aperos pliaj informoj pri la skolta movado en Esperanto ĝis la monato junio de 1983. Tiam, Luis GILPÉREZ FRAILE, sevila esperantisto ekigas kunlaboradon en *Revuo de SEJO* (Sevilja Esperantista Junulara Organizo), pritraktante skoltajn temojn.

La titolo de la skolta rubriko de la revuo estis "La agadoj de Molpiedo". Molpiedo estis juna skoltisto kiu parolis en la artikoloj pri skoltaj agadoj, ekz. kiel kalkuli la altecon de la arboj ne uzante mezurilojn, kiel konstrui ponton sur kanaletoj aŭ kiel fabriki antenon por radio-ricevilo. La revuo, kaj kompreneble ankaŭ la skolta rubriko, malaperis post sia dekseca numero en junio de 1984.

Ni volas krei veran arĥivon, la arĥivon de

Via memoro. Do, se Vi ne scias kion fari kun Viaj Esperantaj revuoj aŭ alitipaj esperantaĵoj kaj Vi estas preta doni ilin al ni, bonvolu kontakti kun ni. Ni pagus ĉiajn sendokostojn.

HISTORIA ARĤIVO DE AEU  
Poŝtkesto 611 E-14080 CÓRDOBA  
esperanto14@supercable.es



## RADIOAMATORA ANGULO



ECB 14-JOO *Stacio Esperanto*

### La Longdistanca Radioaŭskultado aŭ Radio-DX

La longdistanca radioaŭskultado, pli konata kiel Radio-DX, estas ŝatokupo bazita ankaŭ je la radio-ondoj, tamen ne tute egalas al radioamatorismo. La longdistanca radioaŭskultanto dediĉas sian liberan tempon serĉi, agordi, aŭskulti kaj identigi longdistancajn radio-elsendejojn. Tiuj radio-stacioj povas elsendi el kiu ajn parto de la mondo kaj la ebleco ricevi iliajn ondojn dependas de la atmosferajn kondiĉojn kaj de la disvastigo de la ondoj. La literoj DX (do-ikso) devenas de la vortoj D *distanco* kaj X *nekonata*, ĝi indikas la devenon de la aŭskulteblaj radiostacioj, t.e. ili troviĝas je nekonata distanco DX.

La celo de ĉi tiu ŝatokupo estas duobla. Unuflanke, el la teknika vidpunkto la radioaŭskultanto provas plibonigi siajn radioricevilojn ĉiumomente kaj ankaŭ studi la kondiĉojn kaj ĉi tiel koni el kiu parto de la mondo estas pli facile ricevi la ondojn en ĉiu momento. Aliflanke, el la kultura kaj informa vidpunkto, la radioaŭskultado helpas plibonigi la konojn de eksterlandaj lingvoj kaj krome la informadon ricevitan de aferoj laŭ la vidpunkto de parolantoj de la plej lontanaj landoj kaj regionoj de la mondo.

Se paroli pri Esperanto jam estas sufiĉe konata ke naciaj radiostacioj elsendas programojn en Esperanto, tiel, Vatikanurbo, Pollando, Ĉinio, Aŭstrio... Se paroli pri la hispana lingvo, landoj tiel lontanaj kiel Ĉinio, Egiptio, Irano, Koreio aŭ Japanio ofertas hispanlingvajn programojn aŭskulteblaj en nia lando dank'al potencaj radioriceviloj kaj antenoj.

Mi devas agnoski ke mia plej ŝatata radiostacio, se paroli pri longdistanca radioaŭskultado, estas la israela *KOL ISRAEL*, parolanta en la judhispana lingvo, ankaŭ nomata *ladino*. La celo de ĉi tiu servo estas atingi la judajn komunumoj kiuj ankoraŭ uzas ĉi tiun lingvon, ĉefe en Turkio, Jugoslavio kaj kelkaj zonoj en la nordo de Afriko. Estas vera plezuro por la kompreno aŭdi konversaciojn, informojn kaj kantaĵojn en ĉi tiu antikvega lingvo, kiu tutcerte estas la hispana pralingvo.

En Hispanio ekzistas kelkaj kluboj kie renkontiĝas la longdistancaj radioaŭskultantoj, ĉefe en Madrido kaj en Barcelono. En Esperantio ekzistas AERA kiu, laŭstatute, kunigas la fortojn de esperantlingvaj radio-aŭskultantoj kaj servas al la kultura fenomeno de parolata lingvo pere de radioelsendejoj.



Dank'al ĉiu difino Vi trovos vorton. La sekvantan vorton Vi trovos uzante la samajn literojn, escepte de tiu kiu aperas ene de kvadrato. Por iel helpi Vin ni donas la unuan kaj lastan literon de la unua vorto.

K \_\_\_\_\_ □ \_\_\_\_\_ E  
(Adverbe, mezurunuo de la eksplodaj substancoj)

\_\_\_\_\_ □ \_\_\_\_\_  
(Persono, kiu aĉetas kutime ĉe iu komercisto)

\_\_\_\_\_ □ \_\_\_\_\_  
(Malgranda vegetaĵo formita de fungo kun algo kreskanta sur muroj kaj arboj)

\_\_\_\_\_ □ \_\_\_\_\_  
(oblikvigo de io vertikala)

\_\_\_\_\_ □ \_\_\_\_\_  
(Meti iun aŭ ion en difinitan lokon)

□ \_\_\_\_\_  
(Instrumento, aparato)

□ \_\_\_\_\_  
(dekseca litero de la alfabeto)

\_\_\_\_\_ □ \_\_\_\_\_  
(ĉu vokalo? ĉu nenio)

La solvon, kiel kutime, Vi trovos sur la paĝo 34-a. Bonŝancon !!!



## ANDALUZA KUIRARTO

### Terpomoj je la malriĉa stilo

La nomo de ĉi tiu konata andaluzia manĝaĵo povas deveni el du fontoj. Unuflanke, ĝi povas indiki la manieron kiel la malriĉuloj manĝis la terpomojn. Due, ĝi povas alvoki la ideon ke en ĉi tiu manĝaĵo la terpomoj estas preskaŭ izolitaj, t.e. povraj. Verŝajne la nomo devenas de ambaŭ sencoj.

Kvankam la povra aspekto de ĉi tiu recepto perdiĝis kun la tempo ĉar hodiaŭ ekzistas variantoj kie abundas ĉefe ovoj kaj viandoj. Tamen, jen la primitiva formo de unu el la plej tipaj manĝaĵoj de Andaluzio.

#### Jen la Ingredientoj:

- \* 4 grandaj terpomoj, tranĉitaj laŭ maldikaj rondoj. Por demeti la amelon el la terpomoj, oni povas subakvigi ilin dum 20 minutoj, tamen tio ne estas necesa.
- \* 1 verda kapsiko, tranĉita strie.
- \* 1 cepo.
- \* ½ litro da oliv-oleo.
- \* Salo.

#### Jen la farado:

La preparado de ĉi tiu manĝaĵo estas tre simpla, tiel simpla kiel sia propra nomo. Oni varmigas la oliv-oleon ene de granda pato.

Metu la terpomojn kun la salo. Varmigu ilin forte dum 5 minutoj,

movu la paton regule por eviti la bruligon de la terpomoj.

Metu poste la verdan kapsikon kaj la cepon tranĉitaj. Varmigu la tuton, sed ne tro forte, dum pliaj 10 minutoj. Ne forgesu movi regule la paton por eviti la bruligon de la terpomoj.

Gustumu la terpomojn, se necese aldonu pli da salo.

Kiam la manĝaĵo estos preta, demetu iom da oleo el la pato. Metu la paton mem sur la tablo kaj bonan apetiton.

#### Varianto kun ovoj:

Fine, aldonu al la tuto 2 ovojn. Kiru ilin kune kun la tutaĵo (terpomoj, cepo kaj kapsiko). Varmigu ĉion dum kelkaj minutoj.

#### Varianto kun viando :

Aldonu al la tutaĵo friktitan kolbason kaj sangkolbason.

---

Verŝajne ĉi tiu recepto estas tre "forta", sed pensu ke estis komuna manĝaĵo de alitempaj malriĉuloj kiuj ofte manĝis nur unufoje en la tago.

## FLAMENKO

### Peto por deklari la Flamenkon "Pervortan Havaĵon de la Homaro".-

En la jaro 1999 la UNESKO aprobis krei la internacian distingigan signon "Majstraĵoj de la Pervorta kaj Ne-tuŝebla Havaĵo de la Homaro", kies ĉefa celo estas prizorgi la kulturajn spacojn en la mondo. La pasintan jaron la UNESKO jam proklamis la unuajn majstraĵojn de la pervorta havaĵo. Inter ili, atingis ĉi tiun agnoskon la lingvo, la dancado kaj la muziko de *Gafuna*, en Belizo; la muziko de la trumpetoj de la komunumo *Tagbana* en Kotdivoaro; la opero *Kunqu* en Ĉinio; la sanskrita teatro kaj la muziko de la antikva religia ceremoniaro ĉe la sankta loko en *Jongmuo*, Koreio.

La Centro de Studoj pri la Historio de Andaluzio opinias, ke la flamenko meritis atingi la agnoskon "Pervorta Havaĵo de la Homaro", ĉar ĝi estas propra kaj antikva esprimilo de la andaluzia popolo. Krome, ĝi estas homa kreaĵo kiu projekcias sin en la tutan mondon. La formoj de la flamenka kantado, kvankam apartenantaj al la andaluzia kulturo, influis sendube sur aliaj muzikoj en la mondo, ĉu en Ameriko, Eŭropo, Afriko kaj lastatempe en Azio.

La heredaĵo de la flamenka kantado baziĝas tradicie sur la transmisio de la pervorta testamento de niaj prauloj, el la patroj al la filoj, kvankam lastatempe ankaŭ ekzistas gravegaj

kompil-verkaĵoj de antropologoj kaj folklor-studentoj. Tamen, ankoraŭ nuntempe, la flamenko estas esprimilo de sentoj bazita sur la pervorta transmisio.

La proponon de la Centro de Studoj pri la Historio de Andaluzio apogis aliaj kulturaj asocioj kaj eĉ politikaj kaj sociaj instancoj, kiel multaj urbodomoj kaj la Parlamento de Andaluzio mem. Sendube, estus gravega atingo por la flamenka kantado tiu agnosko, ĉefe ĉar internacia kultura organizo deklarus, ke la flamenko, kvankam fizike ne-tuŝebla, estas ĉies propraĵo. Ĝin ni ricevis el niaj patroj kaj ni devos lasi ĝin al niaj filoj.

### Mortis NARANJITO DE TRIANA.-

Ĵus mortis José SÁNCHEZ BERNAL *Naranjito de Triana*. Li naskiĝis en Seviljo en la jaro 1933. *Naranjito* estis serioza kantisto kiu ĉiam emis koni kaj praktiki eĉ la plej ne-konatajn flamenkajn kantaĵ-stilojn. Li preferis kanti en teatroj kaj festivaloj, anstataŭ fari tion ĉe malgrandaj renkontiĝoj da personoj. Tie, la flamenka kantado ŝajnas pli profesia.

Dum la lasta jaroj *Naranjito* ne multe kantis antaŭ la publiko. Li preferis diskonigi sian kant-stilon en Triano, sia kvartalo, al novaj generacioj de flamenkaj kantistoj.

## DIVERSAĴOJ.-

\* KORESPONDI DEZIRAS ĉina delegito de Universala Esperanto-Asocio en la urbo Zaozhuang kun esperantistoj en Granada. SUN MINĜIAO semio@zz-public.sd.cninfo.net

\* VIZITON EN SEVILON. Koran saluton. Mia nomo estas KLAUS DAHMANN, esperantisto el Bonn (Germanio). Laborante por la germana radio-stacio *Deutsche Welle* (Germana Ondo) mi raportos la ĉef-kunvenon de Eŭropa Unio en Sevilla (21-an / 22-an de junio). Ĉar mi daŭre malamas hotelojn, mi deziras demandi pri tranoktebleco en Sevilla. Temus pri la tempo inter la 17-a kaj la 23-a de junio. Ĉu iu povus helpi min trovi kontakton? Por mi ankaŭ estus bele trovi kontakton al esperantistoj kiuj mem ne povos gastigi min. Kore salutas kaj esperas je baldaŭa respondo. Klaus DAHMANN " Klaus.Dahmann@dw-world.de

\* KUN GRANDA DOLORO oni komunikas la forpason komence de januaro 2002 de S-ro Alfonso TUR THOMAS post longa malsano. Li estis konstanta kunlaboranto kun la Instituto Español de Esperanto en Barcelono.

\* KUN GRANDA MALĜOJO oni informas, ke la pasintan 24-an de februaro forpasis nia kara samideano kaj amiko S-ro Luis HERNÁNDEZ YZAL, fondinto kaj direktoro de la Esperanto-Muzeo de Sant Pau d'Ordal en Barcelono. Li ankaŭ estis Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio.

\* APERIS NOVA TURISMA BROŜURO de Valencio en Esperanto, bele presita. Se iu deziras ricevi ĝin, bonvolu kontakti la turisman oficejon de Valenciana Urba Registaro.  
Adreso: Oficina de Turismo. Pza. Ayuntamiento 1. 46001 VALENCIA.

\* PLIA TURISMA BROŜURO. La Aŭtonoma Registaro de Katalunio ĵus eldonis turisman broŝuron en kvin lingvoj, inter ili Esperanto. Mendu senpagan ekzempleron ĉe jena adreso: S-ino Cap de Secció de Publicacions. Direcció General de Turisme. Generalitat de Catalunya 08080 BARCELONA, aŭ rete al mllanos@correu.gencat.es.

\* JUNULARA RENKONTIĜO. Internacia HoRo 2002 okazos en la belega hispana urbo Salamanca, inter la 11-a ĝis la 18-a de julio 2002. Temas pri nova renkontiĝo de la hispana esperantista junularo.  
Pliajn informojn kaj aliĝilon Vi trovos sur la TTT-paĝo <http://www.infonegocio.com/augustocasquero>

## TURISMI EN ... MARTOS

Kvankam ekzistas establejoj de la epoko 2.000 jaroj a.K. en la zono, oni povas aserti ke la iberoj estis la unuaj kiuj kreis organizitan establejon en Martos, ĉiam sub la protekto de la impona rokego konata kiel *Peña de Martos* (prononcu penja). La rokego kaj la turdetana vilaĝo estis bazo por multaj el la luktoj de la lusitana paŝtisto Virjato kontraŭ la romiaj konkerantoj. La romianoj fine konkeris la vilaĝon kaj fondis la *Colonia Augusta Gemella Tuccitana*. La romia nomo de la urbo *Tucci*, sendube venis el la ibera *Tuk*, nomo de la rokego sub kiu establiĝis la praenloĝantoj. Kelkaj epigrafoj ekzistantaj en la vilaĝo, sciigas pri la graveco de la urbo kiu estis liberigata pagi tributojn al Romo.



Blazono de MARTOS

La araboj konkeris la urbon kaj sur ĝi ili fiksas unu el la 16 distriktoj de la *Cora* de Jaeno. Sendube, la fortikaĵo de la romia *Tucci*, kiu ricevis de la araboj la nomon *Mar Tuŝ*, estis efika defendejo de la tuta zono.

La kastilia reĝo Ferdinando la 3-a konkeris la urbon kaj tuj poste li donacis ĝin al la milit-religia ordeno Kalatravo. La nun kastilia *Martos* estis bonega loko por daŭrigi la rekonkeradon de la apudaj zonoj en Jaeno kaj Granada.



Ĉirkaŭ oceano da olivarboj kaj sub la impona rokego troviĝas MARTOS

Dum tiu tempo *Martos* ornamis sin kun belegaj monumentoj, ekz. la *Fuente Nueva* (Nova Fonto) aŭ la Malliberejo, hodiaŭ la Urbodomo. *Martos* fariĝis gravega terkultura loko kiu havigis al la tuta Hispanio sian altkvalitan oliv-oleon kaj ankaŭ tritikojn, kies famo estas menciata eĉ de Cervantes sur "Don Kiĥoto".

Fine de la 19-a jarcento kaj komence de la 20-a, la familioj kiuj enriĉiĝis dank'al la produktado de oliv-oleo, ne forgesu ke *Martos* estas la ĉefa produktanto de ĉi tiu oleo en la tuta mondo, ekkonstruis vilaĝojn bele ornamitaj ekstere kaj interne kaj kiuj hodiaŭ estas juveloj de la modernisma arkitekturo.

Dum la jardeko 1970, establiĝis en *Martos* gravaj industrioj kiuj sendube enriĉigis la tutan zonon, ĝis tiutempe nur dependantaj de la oliv-olea komerco. Hodiaŭ *Martos* estas vilaĝo kiu produktas ne nur tiun naturan altkvalitan produktaĵon, sed ankaŭ oni

elaboras buteron, teksaĵojn kaj ĉefe aŭtomobil-ilarojn.

Nepra vizito meritas en *Martos* la *Fuente Nueva* (Nova Fonto), konstruita dum la renesanca epoko. Kvankam nuntempe, ĝi ne troviĝas ĝuste sur la originala loko, tio helpas nin viziti la apudan promenejon, ĝi estas sendube la plej bela en la tuta provinco, konstruita sur tri terasoj dum la jardeko 1960, tie renkontiĝas ĉiuj enloĝantoj dum la varmaj someraj noktoj.



*Fuente Nueva* en Martos,  
renesanca monumento

Ankaŭ el la renesanca epoko estas la nuntempa Urbodomo, antikva prizono, konstruita sur la antikva parto de la vilaĝo. Sur unu el la muroj de la Urbodomo troviĝas aro da romiaj epigrafoj. Al la vizitemuloj mi eĉ dirus ke por atingi tiun kvartalon estos necese supreniri tra stratoj kun grandaj deklivoj. Ankaŭ en la antikva kvartalo troviĝas la Preĝejo *Santa María de la Villa*. La preĝejo mem estas rekonstruaĵo de alia detruita dum la hispana milito. La perspektivo de la vilaĝo el la preĝejo estas beleaga.

Alia vizitinda loko estas la historia muzeo de la Lernejo "San Antonio de Padua", kie la franciskanaj monaĥoj gardas gravan kolekton da historiaĵoj de *Martos*. Romia ponto ekzistas je kelkaj kilometroj, kvankam la loko ne estas bone prizorgita eĉ ne signita, oni devas aserti ke ĝi estas beleaga. Fine, se Vi ankoraŭ posedas fortojn por promenadi Vi povos supreniri la rokegon, konata kiel *Peña de Martos*. La alteco estas 1.003 metroj kaj la vidaĵo de la tuta zono ekde la plej alta pinto, kie troviĝas la ruinoj de antikva araba kastelo, estas superba.

### Ĉefaj Festoj

Fine de la monato aŭgusto okazas la Foiro de Sankta Bartolomeo. Ĝi estas tipa andaluza festaĵo. La lasta dimanĉo de la monato majo la vilaĝanoj pilgrimadas en la preĝejon de la Virgulino *La Victoria*.

La 8an de decembro okazas la Festo de la Olivoj. En tiu dato komenciĝas oficiale la kolektado de olivoj, la festo estas bonetosa kaj la tuta ĉeestantaro estas invitataj manĝi la faman "oyo *marteño*".

### Kion manĝi?

Kiel matenmanĝon Vi sendube devus gustumi la *oyo marteño*. Peco da pano ŝvitita de oliv-oleo, salmoruo kaj olivoj.

Bongusta estas ankaŭ la *Aceite-Vinagre*, salato farita kun tomato, ajlo, oleo kaj vinagro.

## MISTEROJ KAJ LEGENDOJ DE ANDALUZIO



J.M.R.H.

### La Fratoj *Carvajal* kaj la aljuĝigita Reĝo

La rokego de *Martos*, en la provinco Jaeno, kaj videbla sur la kovrilo de ĉi tiu numero de la revuo, estis la sceno de tragika okazintaĵo en la komenco de la 14-a jarcento, dum la reĝo-tempo de Ferdinando la 4-a. En la urbo Palencio, en Kastilio, estis murdigita de du viroj la kavaliro *Juan de Benavides*, kunulo kaj bona amiko de la reĝo. Ĉi tiu ordonis al la krimjuĝisto de la urbo ekigi intensan esploradon por haltigi la kulpintojn. Sed, malgraŭ la bona laboro de la juĝist oni ne povis aresti la krimulojn.

Kelkajn jarojn poste, okazis nova milito kontraŭ la islama reĝo de Granado. Do, la reĝo Ferdinando la 4-a marŝis en la landliman vilaĝon *Alcaudete* por sieĝi ĝin. Kiam la reĝo trapasis *Martos*, tie troviĝis du kavaliroj de *Caceres* pretaj partopreni en la luktoj kontraŭ la islamanoj kaj apud la kastila reĝo. Kelkaj personoj akuzis ilin antaŭ la reĝo esti la murdistoj de *Juan de Benavides*, iliaj nomoj estis *Pedro* kaj *Juan de Carvajal*. Malgraŭ la suspektoj kaj akuzoj ili deklaris sin senkulpaj kaj petis al la reĝo ekigi procezon por montri ilian senkulpecon pri tiu murdo. Tamen, la reĝo ne akceptis tion. Kaj, ne

malferminte la juĝ-proceduron kaj eĉ sen ebligi ian jan defendon, la reĝo ordonis forĵeti la fratojn el la impona rokego de *Martos*, sub la akuzo esti la murdistoj de *Juan de Benavides*.

Kiam ili estis en la supro de la monto, kaj kompreninte, ke ili mortus maljuste, la fratoj anoncis al la reĝo, ke li mem estus juĝita post 30 tagoj antaŭ la Dia justeco. La fratoj mortis, la kruco kiu montras la lokon kie finiĝis ilia defaliĝo estas ankoraŭ konata en la vilaĝo kiel *la cruz del lloro* (la kruco de la plorado), memorante ke la vilaĝanoj bedaŭris la morton de tiuj senkulpaj kavaliroj.

Ferdinando la 4-a daŭrigis la vojaĝon en *Alcaudete*-n. Tamen, li malsaniĝis kaj reiris en Jaenon. La tagon 7-an de septembro 1312 post siesti, la reĝ-helpantoj decidis vekii la reĝon, sed ili ne povis plenumi tion, ĉar la reĝo mortis dum la dormado. Ĝuste tiun tagon, oni atingis la tridektagan limtempon anoncita de la fratoj *Carvajal* por ĉeesti la Dian juĝon. Ekde tiam, la reĝo Ferdinando la 4-a estas konata kiel "la aljuĝigita".

## Grava Informo

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo jam NE UZOS plu, kiel poŝtan kontakton la Poŝtkeston 864 de Malago. Anstataŭ tiu adreso, se Vi deziras kontakti kun nia asocio, Vi devos sendi leteron al :

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo  
C/ Armengual de la Mota 33, 4-D  
29008 MÁLAGA

## Aniĝu al Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Helpu la Esperanto-Movadon en Andaluzio. Aniĝu al Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Sendu leteron en nian adreson, AEU C/ Armengual de la Mota 33, 4D 29007 MÁLAGA kaj enmetu la ĉi-jaran kotizon –15 eŭrojn – en unu el la subaj banko-kontoj:

- BBVA 0182 3361 340207160711
- Caja General de Ahorros de Granada 2031 0225 54 0100187657

## Andaluzia Esperanto–Unuiĝo Asociación Andaluza de Esperanto

---

## INTERNACIA HORO.

Renkontiĝo de la hispana esperantista junularo. Salamanca 11an / 18an de julio 2002.

Informojn kaj aliĝilon sur la TTT-paĝo  
<http://www.infonegocio.com/augustocasquero>

## ESPERANTO APLIKATA

(Havigitaj de *Dirección General Política de la Pequeña y Mediana Empresa*. Madrido, Hispanio)

Lando: Hispanio

Refe: REF-3795/02

Hispana entrepreno kiu ellaboras ladmanĝaĵojn ajlajn kun tradiciaj receptoj kiel "ajlo marinita", bezonas partnerojn cele al realigado de sia entreprena projekto. La entrepreno situas sin sude de Cuenca-provinco, kun granda akceptado en la loka merkato kaj granda mendado en Centra Eŭropo kaj Ameriko.

Lando: Hispanio

Refe: REF-3796/02

Hispana entrepreno kies fakoj estas libertempaj agadoj, kulturo kaj komunikado por entreprenestroj kaj dungitoj serĉas agentojn pri interhomaj rilatoj kaj entreprenojn pri fakuloj por Hispanio.

Lando: Hispanio

Refe: REF-3797/02

Hispana entrepreno kies fakoj estas distribuado de varoj, serĉas perantojn por plenumi tian distribuadon.

Lando: Hispanio

Refe: REF-3798/02

Entrepreno situanta en Katalunio, kies fakoj estas entreprena logistiko, transporto kaj distribuado, volas kontakti logistikan aganton en EU kaj sudo de Eŭropo ĉefe al klopodo de siaj produktoj: transporto, distribuado, staplo, ktp.

Lando: Hispanio

Refe: REF-3800/02

Hispana fabrikanto de tranĉila akrigilo kaj kun kvinjara garantio, speciale planita por fakuloj: viandvendistoj, kuiristoj, fiŝvendistoj, ktp. serĉas partneron aŭ kunlaboranton cele al vendado de ĉi tiu produkto per la televido, aŭ partneron agantan en la sektoro cele al distribuado per senpera vendado. La venda prezo al kliento estas ĉirkaŭ 60 eŭroj.

Lando: Hispanio

Refe: REF-3801/02

Hispana entrepreno kies fako estas trinkaĵoj serĉas agentojn kaj distribuantojn en EU. Ĝiaj produktoj estas destinitaj kaj al turisma kaj al ĝenerala publiko.



Lando: Hispanio

Refe: REF-3802/02

Hispana entrepreno, lidero en fabrikado kaj distribuado en la grafikarta sektoro kaj en algluiĝaj etiketoj, serĉas afinajn entreprenojn en Portugalio cele al komerco kaj distribuado de siaj produktoj. Oni studos la ekskluzivecon.

Lando: Hispanio

Refe: REF-3808/02

Hispana entrepreno serĉas eksterlandajn firmaojn kiujn interesas sin pri hispanaj produktoj, servoj, konstruaĵoj, investado, klopodo, ktp. Plie, estas kompleta programo por turismaj grupoj.

Lando: Hispanio

Refe: REF-3809/02

Hispana entrepreno kies fako estas la transformado de plasto per injekto (fabrikantoj de porteblaj kaseroloj, terpelveoj, glasoj, teleroj, ujoj por malpuraĵoj, pendigiloj, ktp. serĉas komercan kunlaboranton.

Lando: Hispanio

Refe: REF-3810/02

Hispana distribuentrepreno serĉas fabrikantojn de nutraj produktoj en Hispanio kaj eksterlande.

Respondeculo: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ  
esperanto@navegalia.com



MINISTERIO DE  
ECONOMÍA

SECRETARÍA DE ESTADO DE  
ECONOMÍA, DE LA ENERGÍA  
Y DE LA PYME

DIRECCIÓN GENERAL  
DE POLÍTICA DE LA PYME

---

75-a Kongreso de SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA 1-an / 8-an de julio  
2002 en Alicante (Hispanio).

<http://www.multimania.com/sat-esperanto/kongresoj/kongreso-2002/Alicante2002.html>

Apartado de Correos 4143 03080 Alicante (Hispanio)  
marteno@ctv.es

Solvo al la Vorta Piramido sur la paĝo 24-a

K I L O T O N E

K L I E N T O

L I K E N O

K L I N O

L O K I

I L O

L O

O

---

La venonta numero de *Gazeto Andaluzia* aperos fine de la monato aŭgusto. Se Vi deziras kunlabori kun ni, ne forgesu sendi Viajn kunlaboraĵojn antaŭ la fino de la monato julio, jen niaj adresoj:

- \* Gazeto Andaluzia. Apartado de Correos 3142. E-14080 Córdoba
- \* A.E.U. C/ Armengual de la Mota 33, 4-D E-29007 Málaga
- \* [esperanto@navegalia.com](mailto:esperanto@navegalia.com)
- \* [esperanto14@supercable.es](mailto:esperanto14@supercable.es)

NE FORGESU REKOTIZI POR LA JARO 2002.

## Andaluzia Esperanto-Unuiĝo Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas la disvastigon de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.  
Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

### Estraro

Prezidanto : Andrés Martín González

Vic-Prezidanto: José Francisco Martín del Pozo

Sekretario: Jesús García Martínez

Kasisto: Julio Herrero Segura

Voĉdonanto pri Propagando: José María Rodríguez Hernández

Delegito pri rilatoj kun Blinduloj: Alejandro Iglesias Campos.

Adreso: C/ Armengual de la Mota 33, 4D E-29007 MÁLAGA

E-Adresoj: [esperanto@ciudadfutura.com](mailto:esperanto@ciudadfutura.com)

[esperanto14@supercable.es](mailto:esperanto14@supercable.es)

[esperanto@navegalia.com](mailto:esperanto@navegalia.com)

TTT-paĝo: [www.ciudadfutura.com/esperanto](http://www.ciudadfutura.com/esperanto)

### Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

\* Universala Esperanto-Asocio

Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)

[uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net)

\* Hispana Esperanto-Federacio

C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)

[admin@esperanto-es.net](mailto:admin@esperanto-es.net)

O

## Omajo

“ Jam la unua omajo reganta en Hispanio, eble sekvante la ekzemplon de siaj antaŭuloj en Irako, tuj montris sian inklinon favori la poezion kaj protekti la poetojn. En la omajaj kortegoj ĉiam ekzistis...”

Antonio MARCO BOTELLA *Lirikaj Perloj de Al-Andalus*. Zaragoza (Hispanio) 1995. Paĝo 21-a.

El la araba *umajja*. Antikva araba dinastio kies sidejo estis Damasko. Internaj luktoj provokis la murdon de preskaŭ ĉiuj membroj de la familio, escepte de Abd-al-Rahman' kiu sukcesis fuĝi en la Iberan Duoninsulon. Ĉi tie li fondis sendependan kalifujon Al-Andalus' kies ĉefurbo estis Kordovo.

---

ESPERANT-LINGVAJ VORTOJ KIUJ, HISTORIE AŬ  
ETIMOLOGIE, DEVENAS DE ANDALUZIO.